

### **LASTAJ TAGOJ POR ALIĜI AL LA KURSOJ DE UNED**

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (*Universidad Nacional de Educación a Distancia*, UNED) anoncis la plilongigon de la kursoj de lingvoj, inklude de la Esperanto-kursoj. La nova dato finiĝas tre baldaŭ, la 5an de novembro, do rapidu por aliĝi aŭ por informi eblajn interesatojn.

Ni memorigas ke la kursoj havas du nivelojn: A2 (por komencantoj) kaj B1.


Madrida-Esperanto Liceo proponas doni ĝis kvar stipendiojn al lernantoj, ĉefe junaj, kiuj finos la kurson. La kondiĉojn vi povas peti ĉe adreso: [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es). Krome memoru ke la anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo.

Bonvolu diskonigi, por kreskigi la nombron de lernantoj, kio ebligos la daŭrigon aŭ eĉ ampleksigon en venontaj jaroj. Eblas diskonigi ankaŭ inter homoj ekster Hispanio, ĉar UNED havas sidejojn en aliaj landoj, kaj por la nivelo B1 eĉ ne necesas koni la hispanan, ĉar la instruado okazas rekte en Esperanto.

Pli detale: <https://www.esperanto.es/nueva-edicion-de-los-cursos-de-esperanto-en-la-uned/>.

### **PRESENTADO DE LIBRO EN LA SIDEJO**

La 28-an de oktobro, okazis prelego (en la hispana kun esperantaj klarigoj) en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo. Aŭtoro Sara Sánchez Calvo prezentis sian libron “Jeanne Deroin. Voĉo por la prematoj”, pri Jeanne Deroin, grava pioniro en la lukto por la virinaj rajtoj kaj socialismo en la 19-a jarcento, kiun ŝi estis prezentinta ankaŭ en la SAT-kongreso en Porto ĉi-somere. Ŝin prezentis Mati Montero (ambaŭ en la foto)





## IAM EBLAS ALIĜI AL LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

Kiel jam informite, la venonta 83-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Sorio, dum la feriponto de la 1-a ĝis la 4-a de majo. La LKK (en la apuda foto, dum unu el siaj kunvenoj) jam pretigis multajn informojn, interalie pri la loko, la loĝado kaj manĝado, transportoj, ktp. Krome, oni laboras super la programo de la evento kaj pri la turismaj kaj kulturaj ekskursoj.

Tiujn informojn vi povas legi en la retejo <https://kongreso.esperanto.es/>.

Tie troviĝas ankaŭ la informoj pri aliĝado, kaj la reta aliĝilo mem, krom la listo de la unuaj aliĝintoj. Rapidu kaj rezervu.

## VIZITIS NIN

Konata internacia paro kroata-kebekia Zdravka Metz kaj Normando Fleury vizitas Madridon de la 30a de oktobro ĝis komence de novembro.

La 1an de novembro ili kunvenis kaj kunmanĝis kun kelkaj esperantistoj en la centro de Madrido, kaj ili ankaŭ ĉeestis la unuasabatan renkontiĝon.

## PLIAJ INFORMOJ KAJ KONTAKTOJ

Ni memorigas ke ni renkontiĝas ĉiujn lundojn en la sidejo, ekde la 18,30 horo, por babili kaj praktiki Esperanton. Ĉiu esperantisto estas bonvena, sendepende de sia lingvonivelo.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [https://groups.google.com/g/esperanto\\_madrid/](https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter* aŭ *X*), vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrída>.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo <https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g>

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.



## madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

Redaktas Toño del Barrio

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

